

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- Ni vidis la pasintan semajnon, ke la unua numero de la gazeto *Esperanto* redaktita de Hector Hodler aperis la 12-an de februaro 1907. Ĝi havis la formaton de la nuna *Heroldo de Esperanto* kaj volis esti **duonmonata internacia gazeto**. Ni legis al vi erojn el la front-artikolo verkita de Hector Hodler, kaj vi povis konstati, ke la juna ĝenevano havis precizan labor-programon.

Cl.- Hodiaŭ ni ĵetos rigardon al la aliaj artikoloj de tiu unua numero de la gazeto *Esperanto*. Post la front-artikolo de Hector Hodler rubriko titolita **Tra la mondo** raportas pri la vivo en **Ameriko** kaj en **Germanujo**.

A.- La artikolon pri **Ameriko** verkis la franco Paul Berthelot, la fondinto de la gazeto *Esperanto*. Li certigas, ke la sudamerikaninoj estas civilizitaj. Aŭdu :

Cl.- « *Mi certigas, ke la Orientalinoj estas blankaj ! Mi ankaŭ certigas, ke ili ne vagadas tra dezertaj kamparoj, vestitaj nur per siaj haroj kaj plumoj de kondoro. Mi certigas – ho abomene ! – ke ili ŝajnas havi korsetojn kaj marŝas sur altaj kalkanumoj : sekve, ke ili estas plene civilizitaj... »*

A.- Paul Berthelot poste donas siajn impresojn pri la urbo Montevideo :

Cl.- « *La unua afero, kiun rimarkas la eniranto Montevideon estas speciala ŝajno de la urbo. La tuta duoninsulo, sur kiu ĝi estas konstruita, estas dividita je egalgrandaj kvadratoj per meze larĝaj stratoj tre puraj kaj bonege pavimitaj. La domoj, ĉiuj same altaj, ne havas pli ol unu etaĝo, kaj enlasas la aeron kaj la sunon en la stratojn, malgraŭ la ne tro granda larĝeco de ĉi-tiuj. En tio, la Sudamerikanoj sin montris pli saĝaj ol la Eŭropanoj, kiuj ĉiam deziras larĝegajn strategojn kaj placojn, kiuj fariĝas en somero kvazaŭ Saharoj kaj en vintro Siberioj netraireblaj. Tie-ĉi kaj tie placoj bone ombritaj rompas la unuformecon de tiu reguleco, aliparte gajigita per la diverseco, eleganteco kaj riĉec, de la privataj kaj publikaj domoj, kiuj prezentas ĉiujn stilojn kaj produktojn de moderna fantazio, regata de bona gusto. »*

A.- Ĉu ne bela priskribo de io bedaŭrinde nun anstataŭita de ĉielskrapuloj. Ho, la trankvileco de la bona malnova tempo ! Fine Paul Berthelot raportas pri la esperanto-vivo en Sudameriko. Li mencias, ke ĉiuj gazetoj raportas pri la esperanto-vivo en Sudameriko. Li mencias, ke ĉiuj gazetoj parolis pri la dua Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Ĝenevo en somero 1906.

Cl.- La artikolon pri **Germanujo** verkis la germano Paul Gottfried Christaller. Per sufiĉe nebula raporto ni estas informataj pri la demisiigo de la parlamentanoj far la imperia kanceliero princo Bulow pro la kontraŭstaro de la parlamentanoj al la koloniisma politiko de la registaro. Pri la sinteno de la diversaj tiamaj politikaj partioj ni ricevas tre supraĵan informadon.

A.- Sekvas **Tutmonda kroniko**, kiu resume registras la plej gravajn okazintaĵojn. Jen ero el ĝi :

Cl.- « *10-an de januaro 1907 :*

Lodz.- Kolonelo Patkof, poliestro, estas mortigita.

Santiago (Ĉilio).- Fervoja ektuŝego en stacio Talca. Multaj mortintoj.

Manilla (Filipinoj).- Uragano ruinigas insulojn Leyte kaj Samar. Multaj mortintoj.... »

A.- Tiun registraĵon de katastrofoj kaj politikaj eventoj redaktis la italo Aĥilo Tellini.

Cl.- Sekvas ĝeneralaj **Informoj**. Ni trovas statistikon pri la kreskado de la loĝantaro en Usono inter 1790 kaj 1900, projekton de leĝo diskutota en la Urugvaja Parlamento, raporton pri la produktado de oro en la mondo.

A.- La felietono aperigas novelon de Mark Twain : *La milion-punda banka bileto*.

Cl.- La resto de la informoj vere koncernas esperanton. Sub formo de **enketo-konkurso** estas petataj informoj pri la kostoj de la nutraĵoj en plej diversaj landoj. Tiu konkurso havas la celon :

A.- « ...Montri, ke, per Esperanto, oni povas ricevi multajn utilajn informojn el la tuta mondo sen la ordinara lingvaj malhelpoj, kiujn renkontas tiuj, kiuj volas akiri dokumentojn verajn el ĉiuj landoj... »

Cl.- Ni havos la okazon reveni al tiu enketo, raportante pri aliaj numeroj de la gazeto *Esperanto*. Ĝia malforta flanko ĝuste estis tiu demonstrero. Ofte la esperantistoj entreprenas agadon nur por montri, ke esperanto estas pli efika ol aliaj lingvoj. Fakte ili forgesas, ke esperanto estas ege malregule disvastigita kaj ke la respondoj atenditaj dependas de la bonvolo kaj kunlaboremo de aliaj esperantistoj. Hector Hodler baldaŭ konscios, ke ne estas multe pli facile enketi per esperanto ol per alia lingvo, kiam la monrimedoj mankas.

A.- Historie ludis gravan rolon du rubrikoj. En la unua la franco A. Carles proponas la starigon de **esperanto-konsulejoj**. Por la internaciaj interŝanĝoj li proponas la interakceptadon de la poŝtmarkoj. Tiam ne ekzistis la internaciaj respondkuponoj. Alia franco, Théophile Rousseau, raportas en la dua artikolo pri **konsuloficejo**, kiu estis malfermita en Le Creusot, franca urbo, en tabak-vendejo. Jen ero el tiu interesa teksto :

Cl.- « ...Supozu, ke vi alvenas en Le Creusot. Certe vi iros sur la placon Schneider, tute en la centro de la urbo ; kaj ankaŭ certe vi vidos ĉe tiu placo tabak-vendejon, sur kies fenestrego estas pentrita diklitere : **Esperantista Konsulejo, Esperanto-Oficejo**. Vi certe, ĉu ne ? eniros. Kaj la vendistino, vidinte vian verdan stelon aŭ aŭdinte, ke vi parolas Esperanton, donos al vi folieton, sur kiu vi legos :

1^e) Sciigojn por viziti la urbon kaj la tutmonde faman fabrikejon.

2^e) Adresojn de la hoteloj, kafejoj kaj aliaj esperantistaj komercistoj.

3^e) Adresojn de la esperantista klubo aŭ kunveno, ĉe kie vi estos plezure kaj kore akceptata.

4^e) Malgrandan vortareton kun traduko kaj elparolo de kelkaj francaj vortoj, kiuj estos al vi necesaj por iri tra la urbo.

5^e) Liston kaj adresaron de dek personoj, kiuj volonte donos al vi, sebezzone, pluajn sciigojn.

6^e) Reklamojn de la tieaj neesperantistaj kaj esperantistaj komercistoj.... »

A.- El tiuj provoj starigi reton de konsuloj kaj konsulejoj naskiĝis la saman jaron Universala Esperanto-Asocio kaj ties delegitara servo. Certe la regula aperado de la gazeto *Esperanto* favoris tiun kreadon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-